

La NASKa Fasko

Ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe la Universitato de Viktorio

london, la 30-an de Junio, 2014 • numero unu

Kio okazos hodiaŭ?



★8:50 atm – tagmezo: Ekster nia loĝejo

Kunvenu en la korto ekster nia loĝejo; ni iros grupe al la konstruaĵo *Student Union Building* por enkonduko al NASK.

★3:00 – 4:00 ptm: Student Union Building Dua etaĝo (“Upper Lounge”)

Nia instruisto István ERTL prezentos pri la revuo BA, kiun li redaktas kun Jorge CAMACHO kaj Probal DAŠGUPTO.

★7:00 – 8:00 ptm: Student Union Building Upper Lounge

Francisko LORRAIN prezentos pri la lastatempe eldonita libro *Kristnaskaj rakontoj el franca Kanado*.

La NASKa Fasko

Redaktejo: Ĉambro 203

<nask.esperanto@gmail.com>

La NASKa Fasko estas ĉiutaga ĵurnalo de la kursaro.

Se vi volas kontribui mallongan artikolon, foton, ŝercon, bildstrion, leteron, poemon, am-leteron, ktp. bonvolu alporti ĝin al la redaktejo en ĉambro 203, aŭ – eĉ pli bone – sendu ĝin al <nask.esperanto@gmail.com>.

Bonvenon al Viktorio! / Welcome to Victoria!



Hoss FIROOZNI jam laboras ĉe NASK ekde 2008. Li gvidas la eksterkurajn eventojn kaj redaktas la ĵurnalon La NASKa Fasko (kiun vi nun legas!) Vi vidus lin freneze kuranta tien kaj reen dum la kursaro.

Bonvenon al NASK! Post monatoj da retpoŝta kontakto mi ĝojas finfine vidi vin ĉiujn en la “reala mondo”! Se vi ankoraŭ ne decidis ĉu fari eksterkursan prezenton aŭ verki artikolon por la *Fasko*, mi kuraĝigas vin provi. Kelkaj lernantoj en la altnivela kurso pretas helpi vin pri verkado kaj polurado, se vi volas. Ili portos ridetantajn vizaĝojn (☺) sur siaj nomŝildoj – do serĉu ilin kaj ne hezitu peti helpon!

Hodiaŭ ni havos por vi du prezentojn post la unuaj kurskunsidoj. En la post-

tagmezo instruisto István ERTL faros prezenton pri la revuo *Beletra Almanako*, kiun li kunredaktas. Kaj vespere, Francisko LORRAIN (vidu lian artikolon sube!) faros prezenton pri la libro *Kristnaskaj rakontoj el franca Kanado*.

Morgaŭ estos Kanada Tago, granda festotago por celebri la tagon en 1867 kiam Kanado naskiĝis. En la posttagmezo (post viaj kursoj) ni iros al la urbocentro de Viktorio por ĝui la etoson kaj – post sunsubiro – spekti artfajraĵojn. Mi havos por vi pli detalan informon en la morgaŭa *Fasko*.

Ĉu kristnaskaj rakontoj somermeze?

de Francisko LORRAIN



Jes, tio estos, almenaŭ parte, la temo de mia prezentaĵo, hodiaŭ vespere! Fakte mi parolos pri libro aperinta lastoktobre, *Kristnaskaj rakontoj el franca Kanado*, kies eldonadon mi prizorgis. Eble vi jam legis artikolon pri ĝi en revuo, kiel *Kontakto*, *Usona Esperantisto*, *Lumo* aŭ *La Riverego*. Sed en tiu prezentaĵo mi diros multe pli, ol eblis en revua artikolo.

Mi prezentos unue la aŭtoron, Louis FRÉCHETTE, kredeble la plej grandan franckanadan verkiston de la 19-a jarcento. Li estis progresema homo kaj havis sufiĉe buntan vivon. Poste vi aŭdos pri la ilustrinto de la libro, la konata kanada

pentristo Frederick Simpson COBURN. Sekvos komparado de la du eldonoj de la libro (1972 kaj 2013), dum kiu mi montruos, interalie, kial mi devis pli-malpli refari la tutan tradukon.

Post tio vi ekscios, kiom da laboro postulis tia eldona projekto, ne nur mialflanke, sed ankaŭ flanke de la profesia grafikisto respondeca pri enpaŝigado, kompostado, desegnado de mapoj kaj traktado de bildoj.

Fine, por doni al vi pli konkretan ideon pri la enhavo de la libro kaj stilo de la aŭtoro, mi legos du paĝojn el la unua rakonto.



Salutoj de kelkaj membroj el la NASK-a skipo

Lee (Liĉjo) MILLER

Karaj NASKanoj de 2014,

Saluton, kaj bonvenon! Vi estas membroj en la plej granda NASK-kursaro de multaj jaroj, kaj mi volas danki vin pro viaj intereso kaj entuziasmo. Kaj en 2014, la unuan fojon en Kanado okazas NASK! Historia evento!

NASK estas unika sperto, aparte en Usono (kaj nun en Kanado). Nur ĉi tie dum pluraj sinsekvaj tagoj vi havos la ŝancon paroli Esperanton en granda grupo, pri plej naturaj, ĉiutagaj aferoj. Nur ĉi tie vi povas konversacii en Esperanto kiel la "normala" lingvo de ĉiutaga vivo. Mi ĉiam kuraĝigas homojn: ne maltrafu la okazon! En ĉiu momento ĝuu la vivon inter esperantistoj, provu kiel eble plej multe uzi la lingvon, lernu pri ĝi, kiel ĝi sonas kaj kiel homoj parolas ĝin. La plej grava afero estas ne silenti. Foje homoj timas paroli en ne-tre-bone-konata lingvo. Sed sen parolado (kaj sufiĉe multe da eraroj kaj korektoj) vi ne povos *pli bone* paroli.

La celo de lingvo-lernado ne estas perfekteco, sed progreso. Se en la fino de NASK vi povos diri "mi pli bone parolas, pli bone komprenas, pli multe scias" ol en la komenco, jen la indikiloj de sukceso. Se en la fino de NASK vi diros "mi ankoraŭ ne perfekte parolas Esperanton"... nu, jen tasko por via vivo post NASK.

Ni havas skipon de instruistoj kaj helpantoj kiuj estas ĉi tie por vi. Se vi bezonas klarigon aŭ helpon pri io, ne hezitu peti. Se vi diras nenion, ni plej verŝajne supozos ke vi estas kontenta... do nepre informu nin, kiel ni povas plej bone helpi vin.

— Lee (Liĉjo) MILLER
Membro de la NASK-Teamo



Ellen EDDY

Estis mia plezuro helpi aranĝi ke vi ĉiuj povas esti parto de unua NASK ekster Usono. Mi estas la administranto de la programo kaj loĝas inter vi en ĉambro n-ro 207. Pro la fakto ke ĉi tiu loko estas nova ne nur por vi sed ankaŭ por la instruista teamo, estas eble ke je la komenco etaj problemoj aŭ miskomprenoj okazos. Ofte mi povas solvi ilin se oni nur petos helpon. Do ne hezitu! Mi esperas ke ĉio iros glate kaj vi revenos hejme kun nur bonaj memoroj de via restado. Ellen Eddy 206-300-9724 dum NASK aŭ <eddyellen@aol.com>.

It was a pleasure to help arrange for you to be a part of the first NASK outside the USA. I am the administrator of the program and live among you in Room #207. Because this place is new not only for you, but also for the instructional team, it is possible that in the beginning small problems or misunderstandings will happen. Often I can solve them if only a person asks for help. So don't hesitate! I hope everything goes smoothly and you return home with only good memories of your stay. Ellen Eddy 206-300-9724 during NASK or <eddyellen@aol.com>.

István ERTL

En la fora jaro 1990 mi vizitis Usonon kaj Kanadon por la unua fojo, kaj jam levigis la ideo ke mi foje instruu en somera Esperanto-kursaro ĉi-kontinente. La jaroj pasis, kaj ĉiam io malhelpis la re-



aliĝon de tiu revo. Des pli mi ĝojas ke nun mi povas veni al vi, interalie post jardeka laboro kiel redaktoro de la monata revuo de UEA, kaj post aliaj riĉigaj spertoj Esperantujaj. Al multaj homoj mi restas ŝulda pro tiuj riĉiĝoj, ekde Zamenhof ĝis mia edzino, kaj mi esperas transdoni al vi iom el tiuj riĉoj, kiujn mi tenas ĉe mi nur prunte.

Mi intencas utiligi ankaŭ miajn spertojn kiel redaktoro de *Beletra Almanako* kaj kiel preleganto pri Esperanta literaturo ĉe Universitato UAM en Poznań, Pollando. Per aliaj vortoj: atendu de mi precipe literaturon, kiu laŭ mi estas la plej alta esprimiĝo de nia komuna lingvo. Kaj ne atendu de mi komputilajn miraklojn, *Powerpoint*-prezentojn, tajpojn kaj Skajpojn, ĉar kiam ĉe mi teknikaĵo tuŝiĝas, ĝi kutime fuŝiĝas.

Atendu kun timo vortludojn! Tial ke mi regas nek karateon nek kungfuon nek aliajn lukt-artojn, mi kutimas agresi miajn kunhomojn per vortludoj. Sufiĉas demandi miajn gefilojn....

Ĉiuokaze, se vi trovas foje malfacila la digestadon de pezaj pladoj beletraj, mi ĉiam pretos intermeti leĝerajn manĝetojn lingvaj, gramatikajn, kun spicaj akuzativoj....

... kaj ĝenerale klopodos kuiru tiel ke ĉiu trovu bongustan salaton por sia palato!

Via kuiristo/kulturisto/kul-turisto*
— István Ertl

*ĉu estas kuloj en Victoria?

Sed... kio pri la aliaj instruistoj? Ĉu ankaŭ ili ne salutas? Kiel malĝentile!

Bedaŭrinde mankas spaco en la hodiaŭa numero – la aliaj salutoj venos morgaŭ! – Red.

P.S. – ne forgesu verki por la Fasko!